



Bulteno


de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 1/2022 (224)

3. 5. 2022

Duobla jubileo de Eli Urbanová



La 8-an de februaro 2022 pasis 100 jaroj depost la naskiĝo de Eli Urbanová, elstara Esperanta poetino kaj aŭtorino de la aŭtobiografia romano *Hetajro dancas*, multjara estimata membrino de la Esperantista klubo en Prago, honora membrino de UEA kaj de ĈEA, membrino de la Akademio de Esperanto (1986–1995), profesie instruistino. La 20-an de januaro ni ankaŭ rememorigis la 10-an datrevenon de ŝia forpaso. Okaze de tiu duobla jubileo la klubo organizis interretan seminarion (la 20-an de januaro) kaj en tiu-ĉi numero de Bulteno vi trovos ŝian poemon *Curriculum vitae*.

EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj	2
Raporto pri la agado de nia klubo	4
Curriculum vitae (E. Urbanová)	8
Ulrika (A. Melicharová)	11
Novjaraj versoj (V. Ludíková)	17
La parueto (J. Š. Baar)	19

O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brichacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petřík

AKTUALAĴOJ

Okazintaĵoj ekde januaro

20/01/2022 – interreta seminario dediĉita al Eli Urbanová okaze de la 10-a datreveno de ŝia forpaso

17/02/2022 – prezentado de Vlasta Pištíková pri Kalabrio (*kunvenejo*)

03/03/2022 – prelego „Pri Ĉinio kaj Koreio subjektive“ de Petr Chrdle (*kunvenejo*)

17/03/2022 – prelego de Michal Lebl pri interesaj Esperantaj projektoj, en kiuj li partoprenis (*kunvenejo*)

31/03/2022 – ĝenerala kunveno; elektita nova estraro

14/04/2022 – aŭskultado de versoj de Věra Ludíková – ekstera kunveno (*Život 90, Karolíny Světlé*)

28/04/2022 – seminario pri Japanio – pri siaj travivaĵoj kaj spertoj parolis Petr Chrdle, Vlasta Pištíková kaj Petr Javorik (*kunvenejo*)

Zápis ze zasedání členské schůze 31. března 2022

Petr Javorik, Vlasta Pištíková

Dne 31. března 2022 od 17 hod. se konalo v klubovně v ulici Ve Smečkách 25, Praha 1, zasedání členské schůze Klubu esperantistů v Praze, pobočného spolku Českého esperantského svazu, z. s.

Účast

Dle stanov Českého esperantského svazu, z.s. platí, že členská schůze klubu (včetně klubu, který je pobočným spolkem) je schopna usnášet se při účasti alespoň 5 členů s hlasovacím právem. Tato podmínka byla splněna. Účastnilo se 8 členů s hlasovacím právem.

Volba zapisovatele a ověřovatele

Členská schůze jednomyslně (8 hlasy) zvolila jako zapisovatele Petra Javorika a jako ověřovatele Vlastu Pištíkovou.

Zpráva předsedy

Předseda klubu Tomáš Břicháček přednesl zprávu o fungování klubu v období od posledních voleb výboru (7. 2. 2019).

Členská schůze vzala zprávu na vědomí.

Zpráva místopředsedy a pokladníka

Místopředseda a pokladník klubu Jiří Mišurec přednesl zprávu o členské základně a stavu financí.

Členská schůze vzala zprávu na vědomí.

Volba předsedy a dalších členů výboru

Poté proběhla volba předsedy a ostatních členů výboru.

Členská schůze zvolila za předsedu Tomáše Břicháčka (7 hlasů pro, 0 hlasů proti, 1 se zdržel).

Jako místopředseda a pokladník byl zvolen Jiří Mišurec (7 hlasů pro, 0 hlasů proti, 1 se zdržel). Za ostatní členy výboru byli zvoleni Vlasta Piščíková (8 hlasů pro, 0 hlasů proti, 0 se zdržel) a Petr Javorík (8 hlasů pro, 0 hlasů proti, 0 se zdržel).

Volná diskuse

1. Návrh na zvýšení členských příspěvků od roku 2022. Pracující ze 100 Kč na 200 Kč, nepracující z 80 Kč na 100 Kč. Schváleno (8 hlasů pro, 0 hlasů proti, 0 se zdržel).

2. Návštěva čtení básní Věry Ludíkové v rámci schůzky klubu dne 14. 4. 2022.



Foto ze členské schůze, 31. 3. 2022

Termíny schůzek klubu do konce pololetí

12. 5. / 26. 5. / 9. 6. / 23. 6.

Vždy od 17 hod. v klubovně Ve Smečkách – kromě 9. 6. (viz str. 7)

Raporto pri la agado de nia klubo (2/2019–3/2022)

Tomáš Břicháček

Estimataj samideaninoj kaj samideanoj! Karaj geamikoj!

Post tri jaroj la Esperantista klubo en Prago organizas sian ĝeneralan kunvenon. Kiel kutime, tio estas okazo resumi kaj komenti nian agadon kaj gravajn okazintaĵojn de la pasinta periodo, kiu samtempe estis la funkcia periodo de nia kluba komitato.

La komitato, kiu hodiaŭ sumigas antaŭ vi, estis elektita la 7-an de februaro 2019. Ekde la komenco ĝis nun ĝi funkciis en tiu-ĉi konsisto: Tomáš Břicháček (prezidanto), Jiří Mišurec (vicprezidanto kaj kasisto), Vlasta Piščíková, Jan Šebetovský kaj Václav Ondřej Loučka.

Tiuj tri jaroj tutsume estis ege malfacilaj kaj iel-tiel sinusoidaj – ĉar ĉiam ŝanĝiĝis tempoj pli bonaj kaj malpli bonaj. La unuaj monatoj estis tre favoraj – nia programo estis riĉa kaj la aranĝoj estis sufiĉe vizitataj. Bedaŭrinde poste venis la koronviroza pandemio kaj kunligitaj registaraj restriktaj, kiuj forte limigis nin. Ni travivis du kvarantenojn. Dum longaj monatoj ne povis okazi kunvenoj, nek kunaj amasaranĝoj. Ĝis nun ni tute ne reviviĝis.

Malgraŭ tia situacio ni estis relative aktivaj. Ene de la klubo oni organizis pli ol 30 aranĝojn – inkluzive 19 prelegojn aŭ prezentadojn, 8 seminariojn aŭ diskutojn kaj kelkajn festojn. Ankaŭ okazis iuj gravaj agadoj ekstere fare de niaj klubanoj, kiujn indas rememorigi.

Temoj, al kiuj ni dediĉis nin en tiuj aranĝoj, estis diversspecaj: oni parolis pri lingvaj demandoj, pri elstaraj personoj (Kurusu Kei, familio Ginz, Stanislav Schulhof, Bertha von Suttner, Jaroslav Šustr, Stanislava Chrdlová, Čestmír Vidman, Eli Urbanová), pri Esperanto-muzeo en Vieno, pri vivlokoj de Zamenhof, pri novaj libroj de KAVA-PECH kaj pri kelkaj landoj kaj regionoj (Italio, Meksikio, Brazilo, Armenio, Ĉinio, Koreio).

Antaŭ la koronviroza pandemio ni ricevis kvar interesajn gastojn: Unue oni diskutis kun la iama prezidantino de nia klubo Květa Krajíčková. Aŭstra esperantisto Bernhard Tuidler prelegis pri la Esperanto-muzeo, kiun li gvidas. Vizitis nin ankaŭ japana esperantistino Hiroko Katayama kaj arĥivisto Petr Kotyk el la Muzeo de la nacia Literaturo.

El tiu feliĉa parto de la priparolata periodo ni menciis ankaŭ kelkajn gravajn eventojn ekster la klubo rilatajn al niaj klubanoj aŭ aliaj esperantistoj aŭ ĝenerale al Esperanta vivo en Prago:

★ En aprilo 2019 okazis en la Nacia etnografia muzeo publika legado de la poemo *Je jaro de Věra Ludíková*, kiu estis tradukita en kelkaj dekoj da lingvoj inkluzive en Esperanto. La Esperantan version legis sinjorino Margit Turková.

★ En majo 2019 okazis en la Pola instituto publika lanĉo de la libro *Ludvik Lazar Zamenhof – život dílo ideály* de Alexander Korženkov. Libron ĉeĥigis Jindřich Košťálek kaj eldonis ĝin KAVA-PECH.

★ En junio 2019 membroj de E-mental' kreis en Prago reklamon por Esperanto. Ili pentris ĝin sur barilon ĉirkaŭ konstruata domo en la strato Veletržní de Prago. Posedantoj de la barilo – la konstrufirmao – mem proponis al homoj, ke ili laŭplaĉe kreu.

★ Ankaŭ en junio 2019 okazis en la Senato ekspozicio dediĉita al Otokar Březina. La ekspozicion helpis prepari Viktor Dvořák, kiu dum tiu evento ne malzorgis propagandi Esperanton.

★ En oktobro 2019 vizitis Pragon la fama aŭstra esperantisto Martin Stuppniĝ dum sia vojaĝo tra Ĉeĥio, kie li trifoje prezentis sian tre sukcesan libron *Menschlich in der Unmenschlichkeit*. En Prago okazis lanĉo de la ĉeĥa traduko kun la titolo *Vždy lze zůstat člověkem*. La tradukon preparis Jindřiška Dubinová kaj Karel Kauer.

Dum la pandemio nia agado febliĝis, sed ne haltiĝis. En printempo 2020 dum la unua kvaranteno oni kune preparis malgrandan vortaron de terminologio rilata al la koronaviruso kaj tradukon de la rakonto *Vdova v režimu utajení (Vidvino en reĝimo de sekretigo)* de Roman Cílek. Poste dum la dua kvaranteno oni „malkovris“ interretajn kunvenojn – danke al tio okazis kelkaj bonegaj prelegoj – ekzemple tiuj pri Zamenhof kaj liaj vivlokoj en Bialistoko kaj Varsovio fare de Pavla Dvořáková – kaj eĉ la kristnaska vespero en 2020 okazis tiel.

En la lastaj monatoj nia klubo revekiĝas. Denove okazas klasikaj aranĝoj, kvankam ĝis nun malpli vizitataj. Okazas jam ankaŭ eventoj ekster la klubo, ekzemple en oktobro 2021 Margit Turková helpis prepari ekspozicion pri Čestmír Vidman en Rožmitál pod Třemšínem en la loka muzeo.

Parto de la revekiĝo estas ankaŭ nia nova kluba kanalo en Jutubo, kiu estis fondita en septembro 2021. La kanalo estas intencita kiel deponejo de diversaj prelegoj, beletraĵoj, amuzaj programoj, arĥivaj filmoj kaj aliaj interesaĵoj. En la estonteco ĝi povus oferti ankaŭ retan kurson de Esperanto por vasta publiko.

Ĝojigis nin ankaŭ la donaco de sinjorino Hana Šustrová, edzino de la nepo de nia iama prezidanto Jaroslav Šustr. En oktobro 2021 ŝi transdonis al ni valorajn arĥivaĵojn. Dank' al tio ni interalie kunvenas sub la portreta fotoĵo de Šustr.

Nia revuo Bulteno aperis dum la tuta periodo kiel kutime, do trifoje en jaro. Ekde la lasta ĝenerala kunveno aperis 9 numeroj. Du el ili estis specialaj. La numero 3/2019 estis tute dediĉita al nia iama eminenta prezidanto Jaroslav Šustr okaze de la 50-a datreveno de lia forpaso, kaj la numero 3/2021 temis plejparte pri Čestmír Vidman.

Daŭre oni ankaŭ aktualigas nian elektronikan *Kronikon de Esperanto en Prago*, kiu kovras la periodon ekde la komenco de la jaro 2014. La kroniko enhavas jarajn listojn de okazintaĵoj kun datoj kaj diversaj eltondaĵoj, ĉefe el la Bulteno.

Koncerne niajn membrojn kaj favorantojn: Pozitiva okazintaĵo estis la geedziĝo de gesamideanoj Vít G. Mišurec kaj Veronika Venislovas en julio 2019. Male kun bedaŭro ni devas rememorigi forpason de kelkaj samideanoj – nome Helena Štruncová, Marie Drašnarová, Přemysl Hrzán kaj Václav Lamr.


En novembro nia klubo ĝisvivis 120-an datrevenon de ĝia fondiĝo. Estas granda festinda jubileo kaj ni devus prepari por ĝi zorge. Ni povus organizi pli gravajn aranĝojn, kiu povus allogi ankaŭ samideanojn el aliaj urboj kaj eĉ el eksterlando.

Fine mi volus danki al ĉiuj membroj kaj favorantoj, kiuj aktive kunlaboris en organizado de nia klubo, ĝia programo kaj lia revuo. Ĉiu prelego, seminario, amuza socia aranĝo aŭ teksto por la Bulteno estas valora kontribuado por la funkciado de la klubo kaj por la Esperanta vivo en Prago. Speciala danko apartenas al niaj komitatanoj kaj al la aktivuloj, kiuj videbligas Esperanton ankaŭ ekster nia klubo.

Estimataj samideaninoj kaj samideanoj, karaj geamikoj, mi antaŭĝojas pri la daŭrigo de nia renkontiĝado kaj agado kaj mi esperas, ke la klubo post la pandemio baldaŭ komplete reaktiviĝos.

Dankon pro via atento.

Mnohojazyčné čtení z díla Věry Ludíkové



14. dubna, na Zelený čtvrtek, několik členů našeho klubu navštívilo mnohojazyčné čtení díla Věry Ludíkové, konkrétně třetího rozšířeného vydání díla *Kantáta 1 + 5*. Na tuto „výjezdní“ schůzku jsme se vypravili namísto pravidelného setkání ve Smečkách.

Akce, kterou pořádal Americký klub dam, se konala v budově Život 90 v ulici Karolíny Světlé na Starém Městě.

Básniřka Věra Ludíková je aktivní příznivkyní esperanta. Řada jejích děl včetně *Kantáty 1 + 5* byla přeložena do esperanta.

Esperantský překlad *Kantáty* četla na akci Margit Turková.



POZVÁNKA



na oslavu 30 let nakladatelství KAVA-PECH

spojenou s veřejným křtem nově vydaných slovníků
a dalších knih vydaných v coronavirové době
ve spolupráci s Jednotou tlumočnicků a překladatelů

V budově sídla JTP, Senovážné náměstí 23, sál č. 16
ve čtvrtek 9. 6. 2022 od 17:00 hodin



Velký esperantsko-český slovník

Autor: Miroslav Malovec,
760 stran, 145 x 205 mm

*Dosud nejobsažnější
vydání česko-esperantského
slovníku. Obsahuje cca 24 000
hesel a 23 000 odvozenin,
v menším rozsahu i příklady
použití a frazeologii.*



Latinsko-český kapesní slovník (2. vyd.)

Autoři: Jiří A. Čepelák a Hans
H. Ørberg, 79 stran, 10 x 14,5 cm

*Přes 1800
nejfrekventovanějších slov
a slovních spojení. 2. vydání
doplněno o vysvětlení
výslovnosti a úvod do
latinského tvarosloví.*



Čína, Korea, Japonsko: Země podobné, avšak rozdílné

Autor: Petr Chrdle,
247 stran, 17 x 24 cm

*Zážitky z uvedených
zemí doplněné mnoha
barevnými fotografiemi
autora pořízenými během
cest, mj. na univerzitách
a v náboženských centrech.*

*Součástí bude prodejní výstava knih z nakladatelství KAVA-PECH
(již od 16:00 hodin) s příležitostními slevami.
Hudební vložka a příspěvek se skromným pohoštěním.*

LITERATURAJ KAJ KULTURAJ PAĜOJ

Curriculum vitae

Eli Urbanová

1922. Cetera
la daton konas mi parkere
(mi memortenas ja neniun),
ĉar mi naskiĝis jaron tiun.

Nu, kiel ĉiu sana ido
tuj plor' mi estis, tuj ekrida.
Aĥ, panjo, kia pacienco!
Kaj temis sole pri komenco.

Diru, ĉu ebla la enuo?
Paĉjo min lulis sur genuo...
Se li min trovus nur aminda!
Sed lia amo estis blinda.

De la tondil' kaj alumeto
ŝirmis min mia fratineto.
Helena – nomo tiel bela!
Mi diris al ŝi simple Hela.

Por fari el mi la ekzemplon
oni bezonis certan tempon.
Mi lernis danki kaj saluti,
do dece, laŭ bonton' konduti...

Ankoraŭ estis mi infano
kaj plenumita granda plano:
Ni translokiĝis al urbrando
en propran domon kun verando.

Hela ĝojkriis: „Jej, ĝardeno!
Kaj balancilo! Kaj baseno!”
Kiam nin panjo ludi lasis,
tie rapide tempo pasis.

Ĉiuvespere post laboro,
kutime antaŭ naŭa horo,
paĉjo rakontis ĉe la lito
pri la unua mondmilito:

Pri sia viv', dum regis krizo,
pri la subita mobilizo,
pri ofensivo je komando,
pri legionoj, pri Ruslando...

Kiel mi amis paĉjon mian!
Neniu spertis ion tian.
Kaj panjo – mi ŝin ĉirkaŭbrakis.
Neniu tiajn kukojn bakis.

*

Ne devis mia paĉjo timi,
ke instruisto plendos pri mi.
Eksidis mi en benk' giganta
kaj ĉiu vorto estis sankta.

Desegni damojn, ankaŭ bestojn
postulis sole kelkajn gestojn.
Kaj plej sukcesis, eĉ sen scioj
precipe tipaj proporcioj...

Nur panjo, panjo min ne laŭdis.
Ĉar „pro oreloj mi ne aŭdis”.
Nur panjo, panjo ĝojon bridis.
Ĉar „pro okuloj mi ne vidis”.

Dum tag' tralegi tutan libron!
Jes, panjo perdis ekvilibron.
Ŝi antaŭ paĉjo rompis manojn:
„Jen Eli legas jam romanojn!”

Restis rifuĝi al kuniklo,
ĉiam dankema por la tiklo,
aŭ mi kun hundo de najbaro
konkure kuris sur herbaro –

*

Transiro en la gimnazion
superis mian fantazion.
Kvankam mi penis, vere lernis,
tamen atesto min konsternis!

De nun permesi al mi paĉjo
nur iom legi, ne laŭ plaĉo.
Krom tio, ho ve, li kontrolis,
ĉu mi ekstere ne petolis...

Kaŭzo de certa embaraso
estis la knaboj en la klaso.
Bubaĉoj! Sed la baroj falis
kaj ni babilis kaj batalis...

Min persekutis pens' insista:
Legi en libro kuracista.
Fine! Vidante nudan viron
Mi naŭzon sentis kaj deziron...

Mi kelkajn versojn skribi provis.
Ĉar aŭskultantoj mi ne trovis,
mi sendis ilin al gazeto.
Aperis tiu poemeto.

*

Mi decidiĝis dum minuto:
Pedagogia instituto.
Kaj pravigita la aludo –
lernado tie estis ludo.

Des pli okupis min plezuroj
de cent naivaj aventuroj.
Ĉu ne, tuttaŭgis eta justo
pro kis' ŝtelita post arbusto?

Venis la temp' de dancohoroj...
En vico staris la sinjoroj
kaj inter ili – for, frenezo!
Mi dancis kun li ĝis noktmezo...

Mi nu plu estis ja infano.
Al Di' mi dankis, ke sen amo
nedestinite morti al mi,
sed pro feliĉo granda larmi...

Librovendisto riskis faron
eldoni mian poemaron.
Eterna rev', Ne. Rememoro
je jam fermita vund' de l' koro.

*

Jen kio iĝis taga temo
post la matura ekzameno:
Ĉu mi lokiĝos? Anoncsendo
kaj mi atendis do respondon...

Muziklernej'! Mi brulis febre,
sed mia panjo kompreneble
profetis al mi, ke mi plendos,
ke oni min tuj reen sendos...

Ĉu aŭdis panjo unu ĝemon?
En Prag' mi trovis duan hejmon.
Ĉiuj mi ŝatis: Mia ĉefo,
lia edzino, filo Ŝtefo...

Ĉar mi ne timis ŝuojn ŝmiri
kaj plankon lavi kaj kuiri,
kaj kiam tion mi satĝuis,
ludi pianon mi instruis...

De kie mi la fortojn ĉerpis?
Multfoje mi eĉ nokte helpis.
Ĝis nokt' plej nigra finon portis:
Patrin' de Ŝtefo – jes ŝi mortis.

*

Mi, dudekjara, sur vivsojlo,
subite staris antaŭ solvo...
Jam post monato estis nova,
ke mi nomiĝas Urbanová.

Ja kia ŝanĝo en praktiko?
Ĝis la vespero nur muziko:
Violonĉelo, flut', gitaro...
Ofte hirtiĝis la hararo!

Kaj ree funebro... Ni soliĝis...
Ĉu por forges' ni nin dediĉis
al societo? Ĉe ni homoj
alternis kiel noktfantomoj!

Pli ol diskut' kun kamarado
min tenis fata versfarado.
Io rezultis el izolo:
Aŭ poemet' aŭ karambolo.

Kaj poste – poste Esperanto.
Min verso ravis, Ŝtefon kanto.
Kvazaŭ aperus sun' surscene...
Viv' ne finiĝis, Ne, ne! Ne, ne!
Ne, Ne!

„Eli Urbanová estis multflanke eksterordinara virino, ne nur pro sia literatura talento kaj kuraĝo, sed ankaŭ pro sia tutviva beleco kaj nekontestebla fajra karismo, kiun ŝi elradiis, kaj per kiu ŝi nature disdonis energion, entuziasmon kaj inspiron al homoj ĉirkaŭ si.

Ni plu tenu en konscio de geesperantistoj vivan rememoron pri ŝia elstara persono kaj ŝia mirinda verkaro, plena de pasio, bildeca eltrovemo kaj nekutima malfermeco en pritrakto de intimaj temoj (en la plej larĝa senco de la vorto).“

Miroslav Malovec kaj Pavla Dvořáková
www.esperanto.cz

Ulrika

Alena Melicharová

„Ulriko, pojd' sem!“ Ty můj světe,
vždyť byla kousek před námi,
snad běžela za sestrami.
„Pojd', přijel ministr von Goethe!“

Ulrika spěchá: „Ano, mamá!“
a hned se vychovaně klaní.
Stará tvář muže hledí na ni,
usměvává a dobře známá.

Ale dnes je tu hostů víc.
Z Vídně sem zamířila teta,
i hrabě Šternberk jezdí léta
do pohostinných Třebívlic.

A dům dnes také veselý je.
Ulrika, velkým křeslem skrytá,
pozoruje, jak všechny vítá
matka, baronka Amálie.

Potom se hosté rozejdou.
Hrabě Šternberk prohlíží stáje,
vídeňská teta zase hraje
na klavír spolu s Ulrikou.

Přišlo pozvání k obědu,
pak zákusky se podávaly.
Von Goethe česká jídla chválí,
když je baronka v dohledu.

Děti, Ulrika s Amélií,
se tváří jako malé dámy:
smí dnes být mezi hosty samy.
Na venkově si volně žijí,

zmizí i z očí na chvíli
a pohlídá je služebnictvo.
Jen malá Berta má své místo,
ta musí vidět na maminku.

Vokas la patrino al Ulrika pete.
Antaŭ momenteto ŝi ĉi tie estis,
sed ŝi eble ie kun fratinoj restis.
„Hoj, Ulrika, venis jen ministro Goethe!“

Kaj Ulrika kuras, sin al panjo ĵetas,
poste ŝi kliniĝas tute bonkondute.
La konata viro ŝin rigardas mute,
lia olda buŝo larĝe ekridetas.

Tie ĉi hodiaŭ multaj homoj gastas.
Venis la onklino rekte el Vieno,
grafo Šternberk sentas sin jam indiĝeno,
kiun Třebívlice bonvenigi hastas.

Gaja domo gastojn tenas en la sino.
Kaŝas sin Ulrika, spiron mallaŭtigas.
Ŝi rigardas, kiel ĉiujn bonvenigas
kore la patrino, nobla baronino.

Ĉiu el la gastoj havas sian planon.
Grafo Šternberk stalajn trarigardi venas,
aliloke ludas la onklin' viana
kune kun Ulrika la fortepianon.

Al tagmanĝ' invito venas ja senpere,
oni post la manĝo tortojn tuj prezentas.
Laŭ von Goethe ĉeĥa manĝo eminentas,
li al baronino laŭdas ĝin sincere.

Kun Ulrika ankaŭ eta Amelia,
la infanoj kiel damoj gravmienas:
jen, ĉi-foje solaj inter gastojn venas.
Vivo en kamparo estas emocia.

Ili tuj perdiĝas el gepatra vido,
sekve servantaro ilin zorge vartas.
Nur malgranda Berta certe ne apartas,
restas ŝi de panjo dorlotata ido.

Básník, ministr, tajný rada Goethe
zná dcerky od malička
a vždycky bonbóny je hýčká
a jejich společnost si žádá.

Jde s nimi ven. Máloco mívjí,
jmenuje každý strom i květ,
ač nemohou mu rozumět,
mluví o mineralogii.

„Podívejte, mám kamínky!
Vypadají jak kapky krve,
jsou hezčí, než ty bílé prve,
a uvnitř mají plamínky.“

„Ulriko, to jsou pyropy,
český granát se jim tu říká.
Zkrášlí je ruka klenotníka,
co jejich jiskru pochopí.“

Přelilo se pár milých dní
tak jako pohár vrchovatý
a kočár branou mezi vraty
vyjíždí, jen se rozední.

Ulriku vezou do Štrasburku
a vrátí se až na prázdniny.
Goethe má zájem o horniny,
navštěvuje Komorní Hůrku.

Ulrika Levetzowová
se s Goethem zatím jenom mívjí.
Už vrátila se ze studií,
zná etiketu, váží slova.

Čtyři roky se nepotkali,
dětská tvář, ta se zapomene.
A v Mariánkách u pramene
se málem ani nepoznali.

Konsilanto Goethe, krom poet' ministro
filinetojn konas de la beba aĝo,
ĉiam li bonbonojn havas en bagaĝo
kaj ilian kunon petas li pro distro.

Promenante, vante li ne pasas ion,
li por floroj, arboj ĉiam nomon trovas,
kvankam la knabinoj malkompreni povas,
li parolas eĉ pri mineralogio.

„Jen, ĉi tie kuŝas ŝtono tre ornama!
Ĝi aspektas vere kiel sangoguto,
estas ĝi ŝtoneto bela sen disputo,
en ĝi eĉ rebriloj kiel fajro flamas.“

„Tio ĉi, Ulrika, ja piropo ruĝa,
nome ĝi grenato, bohemia ŝtono.
Donas juvelisto al ĝi eĉ fasonon,
se li kun kompreno ĝian belon juĝas.“

La agrablaj tagoj certe sin ne trenas,
oni ja facile malplenigas glason
kaj alvenas fine tempo de forlaso.
Jen, kaleŝ' veturas, korte jam matenas.

Por Ulrika oni vojaĝveston gladas,
el Strasburgo venos ŝi nur por ferioj.
Goethe pri rokaĵoj serĉas novajn sciojn,
al Komorní Hůrka ofte li venadas.

Ulrika Levetzow, nun jam damo juna,
ne renkontis Goethe-n, nur lin pasis eble.
Ŝi jam la studadon finis kaj kredeble
scias ĉiam trovi vorton oportunan.

Tia juna damo rajtas post kvar jaroj
al malgrandulino tute ne simili.
Sekve en banloko ne rekonis ili
unu la alian sur la trotuaro.

Goethe ustrnul: zpět je v čase,
nechápe jeho rozpětí.
Tak jako poupě poupěti
Ulrika matce podobá se,

stojí tu před ním jako květ,
jako obraz matčina mládí
a krásou dojí má a svádí.
Také jí bylo šestnáct let.

Je vzpomínkou, ale je živá
a Goethe je jí unešen...
Ten přelétavý znalec žen
jen vzdychl si a hlavou kývá.

Pak se galantně pozdraví
i s její matkou Amálií,
sebevědomě vypne šiji
a vypráví a vypráví.

A večer sejde k prameni,
jenž je dnes opojný jak víno.
Ve tmě jen okno Ulričino
svítí: snad je to znamení.

Ráno s ní jde na procházku
a nese jí k prameni šálek.
Každou chvíli má pro ni dárek
a tajně myslí na lásku.

Skončilo léto krásné básně,
aby ji touhou nevylekal...
A celou zimu Goethe čekal
na letní Mariánské Lázně.

Zas ji provází po lázních.
Ulrika, světem okouzlená,
vzbuzuje obdiv: dítě – žena
a básník – stařec budí smích.

Baronka Amálie tuší,
že není všechno, jak má být,

Konsterniĝis Goethe, li eĉ ne jubilas,
la monumento estis stranga pagadmono.
Kiel florburĝono al floroburĝono
jen Ulrika plene al patrin' similas.

Kiel bela floro antaŭ li ŝi staras,
estas de patrino bildo elokventa.
Per beleco sia emocias, tentas.
La patrino ankaŭ estis dekses-jara.

Vivan rememoron vekas ŝi galante,
Goethe de ŝi estas plene fascinita.
Li – virinspertulo, ŝanĝanima, sprita
nur suspiras, miras, kapon balancante.

Poste li direktas salutrivencon
ankaŭ la patrino, nobla Amalia,
kaj starante rekte – viro memkonscia
longe li rakontas, vera konferenco.

Kaj vespere Goethe iras al la fonto,
akvo ebriiga kiel vino estas.
Lumo en fenestro de Ulrika gestas,
eble ŝi konstruas al li luman ponton.

Ĉiam frumatene li kaj ŝi kunvenas
kaj li al la fonto portas ŝian tason.
Da donacoj havas li por ŝi amason
kaj en sia koro kaŝe amon tenas.

Pasis la somero, kiu ebriigas,
sed ŝin ne timigis lia ama voko...
Vintre antaŭĝojis Goethe je banloko,
Mariánské Lázně homojn interligas.

Li ŝin tra banloko ree akompanas.
Jen: infan' Ulrika de la mond' ravata
eĉ virino juna ŝi tre admirata.
La poet' maljuna sin en moko banas.

Tion rigardante baronin' suspektas,
ke perdiĝis ie juĝo kaj prudento,

že z přátelství se zrodil cit,
jenž starým lidem nepřísluší.

Jsi škodolibý, osude!
Také jej milovala, věru,
však více miluje svoji dceru
a poroučet jí nebude.

A řečí, těch je čím dál víc.
Korunu všemu ještě dodá
výmarský velkovévoda
Karel August, jejich strýc.

„Má milá, Goethe ji má rád,
tak co je na tom vlastně zlého?
Já vím, věk: chápu, přežije ho,
a proto jí chci rentu dát.“

Baronka dceru políbí.
Nechce, aby jen poslouchala
a bez odmlouvání si vzala
toho, komu se zalíbí.

„Není to rozmar, vzniklý k stáru,
dokud to nevíš, nemám klid:
von Goethe si tě touží vzít
jako svou paní do Výmaru.“

Byl by ti otcem, milé dítě,
Je vdovec a má vlivu dosti
i v té nejvyšší společnosti
– ale vzít si ho nenutím tě.

Nemusíš odpovídat hned,
já vím, že se to ani nedá,
když člověk pro a proti hledá
a chce si dobře rozmyslet.“

Von Goethe že je její ctitel?
Po těle chlad se rozhostí.
Vždyť nosí jí jen sladkosti
a vždy se chová jako přítel.

ke el amikeco jam estiĝis sento,
kiun ĉe olduloj oni ne ekspektas.

Kial estas sorto tiom ĉi malica!
Ŝi lian ankaŭ iam amis senrezulte,
la filinon tamen amas ŝi pli multe.
Sed al ŝi ordoni, tio ja ne licas.

Klaĉoj jam multiĝas, vera malbongusto.
Krome en aferon multe da amaro
metas arĥiduko, tiu de Vimaro,
alidire onklo, jes, Karlo Augusto.

„Mia kara, Goethe, jen, de amo bolas,
sekve kiu plago, kiu malbonsorto?
Mi komprenas, aĝo: li pli frue mortos,
mi pro tio renton al ŝi doni volas.“

La patrin' filinon vere tre favoras,
tial ja ne volas, ke ŝi sen rezisto
jesu al edziĝo kun iu sofisto,
kiu ŝian belon malkaŝeme gloras.

„Tio ja ne estas iu pensbizaro
de oldulo, tion devas vi kompreni:
Goethe ja sopiras multe vin kunpreni
kiel la edzinon hejmen al Vimaro.“

Via patro, kara, povus li fariĝi,
li jam estas vidvo, multe li influas,
eĉ kun altranguloj ofte rendevuas
– sed vi ne bezonas al li edziniĝi.

Hasti kun respondo estas nebezone,
estas malfacile, tion mi ja scias,
trovi elirsolvojn, kiuj harmonias
kaj pri tio ĉion konsideri bone.“

Ĉu von Goethe vere tiom ŝin adoras?
Ŝi subitan fridon sentis sub korsaĝo.
Li nur portas al ŝi multe da dolĉaĝoj,
estas li amiko, kiu ŝin favoras.

– a navíc, je to starý muž!
A s překvapeným studem dívky
choulí se celá do pokrývky.
Ulrika není dítě už!

Nechce se vdávat, je tak mladá,
nechce být první dvorní dámou.
Chce být Ulrikou, sebou samou.
i když má Goetha tuze ráda

– a vlastně: on ji na rty líbal
a k sobě přitiskl na plese
a pokaždé jí veršik nese...
Myšlenky letí jako přívál.

Urazit by ho neměla,
je tak pozorný a milý...
Ulrika váhá, váhá chvíli,
ale už ví, co neudělá,

a všeho je jí hrozně líto.
Nedokáže dát naději,
snad umřela by raději,
ať řekne co chce, ublíží to.

Je čas odjezdu. Vráti se
zase na panství Třebívlice.
A pobledlá jako ta svíce
hovořit s Goethem bojí se.

Omluvila se. Odpoví,
až zase bude v klidu doma.
Kdo jí poradí, jak jenom má
napsat odpověď radovi?

Tajný rada se sklesle tváří:
pozdní láska je jako sen,
nechce zůstat nepochopen,
bolí jej, tuze bolí stáří,

– nu kaj plie tamen, li sufiĉe oldas!
Kaj ŝi surprizita, plena de pudoro
sub kovrilon kaŝas la knabinan ploron.
Ŝi virinan sorton pro rankoro skoldas.

Ŝi, estante juna, je edziĝ' angoras,
ŝi eĉ ne inklinas tuj sin alivesti
por kortega damo, volas ŝi mem esti,
spite, ke ŝi Goethe-n vere tre favoras.

Li ŝin ja verdire sur la lipojn kisas
kaj ŝin al si premis foje en la balo,
versojn alportadas tiu najtingalo...
Pensoj tre impete saltas, zomas, glisas.

Ŝi lin ja ofendi certe ne scipovus,
estas li afabla, per komplez' dotita...
Longe ŝi cerbumas, longe ŝi hezitas
por ekkoni, kion fari ŝi ne povus.

Je bedaŭro menso pli kaj pli abundas.
Ŝi ja ne sukcesos lin pli esperigi,
eble ŝi preferus morti, sin mortigi,
kion ajn ŝi dirus, lian koron vundas.

Tempo maturiĝis kaj ŝi forvojaĝas.
Jes, al Třebívlice, al feŭdobieno.
Pala, sen koloro, plena de ĉagreno
alparoli Goethe-n ŝi ja malkuraĝas.

Ŝi sin senkulpigis. Certe ŝi respondos
kiam ŝi revenos hejmen por ripozi.
Kiel al ministro, kiel vortojn dozi?
Kiu tion scias al amikorondo?

Goethe deprimita. Triste li mienas:
tarda amo estas sorto de edeno,
li ne volas resti tute sen kompreno,
maljunaĝo ege, ege lin ĉagrenas.

co tělo obrůstá jak mech.
A slavný básník své šediny
sklání nad ruce Ulričiny
a při polibku tají dech.

Pomalů čas se ubírá,
když nese velká rozhodnutí.
Von Goethe do klidu se nutí
a nožem dopis otvírá.

Neodmítla ho přece, že ne?!
A ani límec nezakryje,
že mu na poplach bije
to staré srdce usoužené.

„Můj vážený, já Vás mám ráda.
Rozhodnout se je těžká věc,
a já nechci být vetřelec,
co místo Vaší ženy žádá.

Máte syna, ten s Vámi žije
i s rodinou ve Vašem domě,
a špatně byste hledal pro mě
úlohu, kde rád navyklý je.

Kdybyste byl sám a já byla
Vám k užítku, a to bych chtěla,
nikdy bych se nerozmýšlela:
je ve Vás zvláštní krásná síla.

Zůstanu sama. Do ústraní
odejdu tiše a chci nésti
až do smrti ten pocit štěstí
že měla jsem být Vaší paní.“

Nepřišla žádná odpověď,
jen balíček a v něm pár řádek,
napsaných spíš jen pro pořádek.
A co si s nimi počít teď?

*Dárek, prosím, neodmítněte
– a ať Vás těší mnoho dní...*

Kaj ne imagebla ia kompromiso.
La poeto sian grizan kapon klinas
al subtilaj manoj, kiuj lin fascino,
kaj retenas spiron dum varmega kiso.

Tempo ĉiam paŝas malrapide, lante,
kiam ĝi kun grava komuniko venas.
Goethe de ekscito daŭre sin detenas
super la letero, tuj ĝin malfermante.

Ĉu ŝi ne refuzis al li korfavoron?!
Kaj ne sekretigas eĉ vestaĵo varma,
ke sub ĝi impete batas, eĉ alarmas
la suferigita trista olda koro.

„Aĥ, sinjoro Goethe, mi Vin vere ŝatas.
Malfacile por mi ĝuste decidiĝi,
Ja entrudiĝinto mi ne volas iĝi
kaj edzinposteno estu dibenata.

Via filo vivas kun Vi en akordo
jam en Via domo kun la familio,
kaj facile povas eki kolizio
inter mia rolo kaj kutima ordo.

Se Vi estus sola, ĵure mi deklaras,
ke al Vi fidele volus mi utili,
kaj ne eblus al mi tion malkonsili:
pro mensforto Via eksterordinara.

Plue do solece estas mi vivonta.
Nome mi foriros, vole, sen lamento,
plena de feliĉo, de varmiga sento,
ke edzin' mi Via estis fariĝonta.”

Sed neniŭ karto kun respondo venis,
venis nur paketo, en ĝi du linioj,
ŝajne alskribitaj nur pro konvencio.
Kiel oni povas ilin subkompreni?

*Vi bonvolu preni mian donaceton
– ĝi Vin feliĉigu daŭre ĝis la fino...*

Granátový šperk básník Goethe
daroval lásce poslední.

A Ulrika se neprovdala,
do smrti sama žila dál:
žádný muž se nepodobal
básníku, jež obdivovala.

Na hřbitově u Třebívlic
je náhrobek, na něm pár slov...
Jméno Ulrika Levetzow
je dávný příběh – a nic víc.

Jen, grenatjuvelon donis la poeto
al Ulrika, sia lasta amatino.

Ŝi ne edziniĝis, edzon ne deziris,
sola ĝis la morto, vivis ŝi sen viro:
ja neniam venis al ŝi kavaliro,
similanta Goethe-n, kiun ŝi admiris.

Apud Třebívlice tombo en tombejo.
Kaj sur tomboŝtono nomo gravurita:
Ulrika Levetzow. Ĝi fariĝis mita,
de okazintaĵo ŝtona deponejo.

Esperantigis Jaroslav Krolupper

Novjaraj versoj Novoročenky

Věra Ludíková

(2001)

Právě teď opona otvírá se.
Kosmické varhany, zvony a tympány
hlásají úžasnou zvěst:
Duch svatý teď člověka posvěcuje,
světloňosem lásky lidství jmenuje.

Duhové mosty vysoko nahoře se otevřely,
nahoře na cestě od Tebe k nám.
Tvá pouta jsou třpytivé elipsy,
jež společně obkružují Tebe a Zem.

Dnes opona Nového věku otvírá se.
My ŝeptajice svoje prosby
voláme Tebe, Pane, k nám,
abys Zemi zvolil za svoje sídlo.
skrze Syna abys vládl nám.

(2001)

Ĝuste nun la kurteno malfermiĝas.
La kosmaj orgenoj, sonoriloj kaj timpanoj
heroldas imponan mesaĝon:
La Sankta Spirito nun benas la homon,
nomumas la humanismon lumportisto de amo.

La ĉielarkaj pontoj en supraj altoj malfermiĝis,
supre survoje de Vi direkte al ni.
Viaj katenoj estas scintilantaj elipsoj,
kiuj komune ringas Vin kaj la Teron.

Hodiaŭ la kurteno de Nova Epoko malfermiĝas.
Ni frustrante niajn petojn
vokas Vin, Sinjoro, al ni,
ke vi elektu la Teron Via rezidejo,
pere de Filo ke vin nin regu.

Esperantigis Miroslav Malovec

(2002)

Břehy se zavřely ledovcově.
Sukničky průhledové napoví,
že hnízdiště jsou už opuštěná.
S dýmantovou čelenkou kráska spí.
Do jarních tání má být trpělivá

Zelený věnec na dveřích
na ojiňněném dvorku
už dávno ohlásil,
že advent se naplní,
až zrodí se děťátko,
naděje pro lásku.

Rozžatá svíčka na svátečním stole,
káva a moučník na talířku,
hladivé slovo umět říci –
tolik je poezie nedoznělé.

(2002)


La bordoj fermiĝis glacie.
Jupetoj diafanaj sufloras,
ke kovejoj estas jam forlasitaj.
Kun diamanta diademo belulino dormas.
Ĝis la printempa degelo ĝi devas pacienci.

Verda florkrono sur pordo
sur prujnkovrita korteto
jam antaŭlonge anoncis,
ke la advento plenumiĝos,
kiam naskiĝos la infaneto,
espero por la amo.

Brulanta kandelo sur solena tablo,
kafo kaj deserto sur telereto,
scii diri karesan vorton –
tiom da poezio nefinsonanta estas.

Esperantigis Jaroslav Mráz

Soumrak bílého muže



Na pulty přichází nové upravené vydání knížky Benjamina Kurase *Soumrak bílého muže*. Autor rozkrývá informovaně a místy humorně příčiny a události vedoucí k sebedestrukci moderní západní civilizace. Pokouší se vystopovat paralelně probíhající a často opomíjené proudy filosofie a psychologie tvoření, sebezlepšování a duchovní a morální obnovy navazující na kreativní tradice Západu, a to od biblické etiky, přes protestantskou etiku kapitalismu, vědeckou a technickou revoluci, až po nejnovější psychologické objevy. I tato Kurasova kniha má ctižádost „4P“ – pobavit, poučit a přimět k přemýšlení.

La parueto

Jindřich Šimon Baar

Sur altaĵo super la vilaĝo sidas malnova preĝejo de sankta Laŭrenco. Ĝi sidas tie de multaj jarcentoj tute blanka kiel maljunulo, saĝe kaj senvorte rigardante la longan valon, la suno ĝin kisas, la vento ĝin ĉirkaŭblovetas, la pluvo ĝin vipas, sed ĝi toleras silente kaj trankvile la bonan kaj malbonan veterojn. Foje mi vidis okulon de abelo sub mikroskopo. Tuta reto da etaj okuloj tio estis – belegaj kaj regulaj. Tiajn fenestrojn havas ankaŭ la preĝejo sur nia altaĵo. Ili estas kunmetitaj nur el etaj, zorge enplumbumitaj sesangulaj tabuletoj vitraj, kaj per tiuj ĉi strangaj fenestroj ĝi do rigardas la tutan regionon. La frosto longan tempon desegnis sur ili siajn sorĉajn florojn, ventego skuis ilin, neĝo skurĝis ilin, sed la fenestroj ĉion eltenis, ĝis fine ili ĝisatendis – printempon. Ili malklariĝis kaj kiel larmoj fluis sur ili la akviĝinta vapore kaj gutfalis sur la mucidan, malvarman plankon. Tiam en la tombejo, sur la tomboj ĉirkaŭ la preĝejo jam ekĝermis la unua herbaro, densa kaj mola kiel delikata pelto, kaj tie kaj tie ĉi nekuraĝe elrigardis el ĝi la dolĉa okulo de blanka lekanto kun flava iriso en sia mezo. Kaj super tiuj tomboj, alte en la ĝis nun kalva branĉaro de tilioj, malpace salfetadis birdoj, ridis kaj kverelis, postflugis unu la alian kaj incitetadis sin, tiel ke tio eĉ ne estis kantado, sed tia senbrida kaj petola kriado, kian scias nur birdoj kiam la printempo estas proksima. Precipe la merlo kun la turdo, ambaŭ majstroj konkurantaj, elpensadis ĉiam novajn kaj novajn akordojn kaj vetfajfis siajn koncizajn kantfrazojn. Ŝprucmakulaj sturnoj pro envio skuis siajn flugilojn, klopodante fidele imiti ilin, sed rikoltis nur mokojn de la tuta birda ĥoro. Precipe la paseroj repepaĉis kiel senlacaj kaj severaj kritikistoj, dum la emberizoj kun la paruetoj kontentiĝis per mallonga bruska melodio – kvazaŭ moka rimarko nur – sed kompanse ili ĝin ripetadis ĝis tedego. Eble du aŭ tri alaŭdoj ŝvebis tiumatene alte super la tombejo, arboj kaj preĝejo, kaj kiel etaj floroj malsuprenfalis el iliaj gorĝetoj la ludaj triloj kaj refreoj.

La kara dia suno leviĝas malrapide pli kaj pli alten. Per siaj radioj, kvazaŭ per delikataj fingroj, ĝi tuŝas la senfolian branĉaron de l' arboj kaj jen – tra la maljunaj korpoj de la arboj, pro delico kaj ĉarmo, ekcirkulas viva suko kaj ĉe l' finaĵoj de la branĉetoj ekŝvelas, grandiĝas kaj krevas verdaj burĝonoj. La suno scivole enrigardas tra la aperturoj de la lignaj ĵaluzioj ankaŭ en la turon, – la malnova sonorilo ekbalanciĝas kaj al la homoj malsupre en la vilaĝo ŝajnas, ke jam longe ĝi ne invitis ilin tiel feste kaj majeste al la matena meso sankta, kiel hodiaŭ je la ŝatata festo de Anunco de sankta Maria. Malmultaj sukcesis kontraŭstari kaj ne obei. Plej unue alkuris la infanoj. Sian senzorgan ridon ili miksis kun la birda kantado, alvokis ĉi tien knabinojn, ilin sekvis la knaboj kaj antaŭ ol oni

sonorigis por kunveni, la tuta vilaĝanaro amasiĝis en sia paroĥa preĝejo. Ĝi odoris ankoraŭ je vintra aero, ĝiaj dikaj muroj elspiris mucidaĵon kaj ĝia granita planko ŝvitis, sed ĝiaj fenestroj jam sekiĝis kaj ekbrilis ĝoje en la suna brilo abunde falanta ĉi tien... Ĉiuj enirejoj de la preĝejo restis larĝe malfermitaj, la malgranda preĝejo ne povis akcepti ĉiujn kaj tial premis sin la homoj – kapo ĉe kapo – en la pordoj, eĉ antaŭ ili kaj varmeta printempa zefiro blovetis super iliaj kapoj tra la preĝeja navo ĝis la altaro en la absido.

Tie staris la pastro en mesa robo kun la evangelio en la mano kaj per simplaj vortoj klarigis la sencon de la festo „anunĉiacio“ ne nur sciigo pri veno de la printempo en la naturo, sed ankaŭ de la printempo idea, nome de Kristo, kies naskon „anĝelo de Dio anoncis al la Virgulino Maria“ la hodiaŭan tagon. Kiam li finis, aŭdiĝis la seriozaj sonoj de l’ orgeno kaj tuj ankaŭ la entuziasma kantado de la homamaso. Kaj ankaŭ tiu kantado sonis hodiaŭ vigle, ĝoje, la brusto per tiu kantado vastiĝis, la vangoj ruĝiĝis, animo kun animo fandiĝis, kaj tiel la festa momento kaj printempa humoro ĉion ĉirkaŭ si estis venkanta kaj ebriiganta per pura ĝojo.

La pastro ĵus turnis sin de la altaro por saluti sian paroĥanaron per la vortoj de Kristo: „Pacon al vi“, kiam, ĉi-momente, okazis io terura. Akra sono, kvazaŭ oni svingus glavon, tranĉis la aeron, ĉiuj kvazaŭ je komando levis la okulojn supren kaj ankaŭ tuj tiris la kapon inter la ŝultrojn. La pastro ĉe l’ altaro staris kiel ŝtoniĝinta; liaj manoj rigidiĝis en la pozo, kiel li estis levinta ilin por la saluto, kaj vortoj formortis sur liaj lipoj. Kiel zigzaga nigra fulmo ekflagris en tiu momento tutproksime super la homamaso du birdoj: malgranda, angore pepanta parueto kaj post ĝi granda alaŭdfalko. La parueto flugis kiel sago rekte al la altaro, sed la alaŭdfalko turnis sin dum sia flugo meze de la navo kaj, antaŭ ol la homoj rekonsciiĝis, ĝi flugis, malalte super iliaj kapoj, tra la pordo eksteren. Kvazaŭ nevidebla mano estus ekpreminta iliajn gorĝojn, ĉiuj subite ĉesis kanti, krio de surprizo kaj teruro sonis tra la preĝejo, sinjoro ĥorestro nesciante, kio okazis, ekstaris malantaŭ la orgeno, streĉis la kolon, rigardis surprizite malsupren kaj el la tuta tonludo nur la orgena pedalo muĝis profunde, timige kaj persiste, ĉar li staris sur ĝi per la tuta pezo de sia korpo.

*

Neniu el la tuta birda aro ĝis hodiaŭ supozis, ke el la sudo revenis ankaŭ ĝia terura malamiko – la maljuna alaŭdfalko. Ĝi revenis sekrete dum nokta malhelo, kaj kiam ĉiuj senzorge ripozis, lacaj pro la longa flugo, ĝi trovis en nemalproksima nigra arbaro sur alta deklivo neston por si. Fremdan neston! Perforte ĝi forpelis el ĝi du nigrajn frugilegojn kaj ekloĝis en ĝi mem kiel hejme. Ĝi dormis en ĝi malsata, kaj post sunleviĝo ĝi flugis el la arbaro la unuan fojon en la vastajn kampojn por ĉasi. Agrabla zefiro taŭzetis ĝian krispan, molan plumaron, varma aero ĉirkaŭis ĝin kiel milda

bano, alte super ĝi la suno ore brilis. Plezure ĝi direktis sin al ĝi kaj en la altego, eĉ etan sonon ne eligante, ĝi ŝvebis silente, sed mortinside. Du longaj, mallarĝaj kaj akrapintaj flugiloj kiel du glavoj etendis sin de ĝia svelta korpo, kiel ventumilo dismetis sin duoncirkle la firmaj plumoj de ĝia vosto, – tiel jam momenton ĝi ŝvebis kaj banis sin ĝoje en la maldensa kaj pura aero, kiam subite atingis ĝian akran aŭdosenton senzorga pepado birdara desur la tero.

Ĝi direktis la okulojn for de la suno malsupren al la tero. Desur sia ĉiela alto ĝi ekvidis flugi super la malseketaj kampoj

grizajn alaŭdetojn, sur la tombejo ĝi vidis preĝejeton kun turo ĉirkaŭitan de arboj kaj en la arbobranĉaro moviĝis kiel insektaro birdoj de ĉia speco.

Senmove, kvazaŭ alfiksita, haltis la alaŭdfalko momenton en la sfero, elserĉante por si rabaĵon. – Sed sammomente ĝin ekvidis alaŭdo. Ĝi ekkonis ĝin kaj kiel fidela kunulo kaj gardanto ĝi tuj flugis kun la terura novaĵo al la tero kaj pepis en la senzorgan birdan kriadon unusolan vorton:

„Falko! – Falko!“

„Kio do! – Kiel do! Kie ĝi estas?“ premzorge, konfuzite tio elpremiĝis el la birdaj gorĝetoj kaj ĉiuj, neatendante respondon, serĉis protekton kaj savon, ĉiu laŭpove. Pro timo mutaj, la birdoj premis sin al la branĉoj, flugis en la arbustojn kaj kaŭriĝis en la nestoj.

Nur la malgranda parueto ne estis hejme, ĝi ne aŭdis la avertantan senditon kaj senzorge, trankvilfluge ĝi estis revenanta nun al sia hejmo. Surprizis ĝin la tomba silento, ĝi ekaŭdis ankaŭ

la avertan vokadon de la fratinoj: „Kaŝu vin, kaŝu vin – falko flugas,“ ĝi direktis sin rapide al kava tilio, kie ĝi estis fondinta varman nesteton remburitan per musko kaj plumoj, kiam eksonis malantaŭ ĝi la bone al ĝi konata flugilsusurado kaj jam ĝi ekvidis la rabiston super si. „Mi ne ĝisflugos – morto atendas min,“ trafulmis ĝian kapon. – Jen tutproksime antaŭ ĝiaj okuloj nigris la malfermita enirejo preĝeja, plena de nekovritaj kapoj homaj, sur la altaro ĝi rimarkis brulantajn vakskandelojn, sen pripenso ĝi direktis sin al ili kaj la alaŭdfalko tuŝproksime malantaŭ ĝi.

Tiel ili enflugis kune en la preĝejon, malaperis dum momento, la preĝejo ilin ambaŭ englutis. Fringeloj kaj kardeloj, turdoj kaj merloj, sturnoj en la budetoj, kolomboj sur la turo mutiĝis de teruro, iliaj koroj senbride bategis, la okuloj direktis sin al la preĝeja pordo, kiam, sammomente, kiel sago, en bela kurba linio elflugis el la preĝejo la alaŭdfalko. Ĝi elflugis sola, ĝi ne tenis en la beko, nek en la ungegoj altiritaj al la korpo, la malgrandan parueton. Ĝi nur eligis koleran krion kaj malaperis en la alto.

„Murdisto, murdisto!“ ie kriis kornikoj.

„Kial vi ne fermis la pordon?! Kial vi ne etendis la manon kaj ne kaptis ĝin – la murdiston raban!“ kriis la homoj ĉe la pordo.

„Kiu supozus tion! Antaŭ ol ni rekonsciiĝis, ĝi estis jam for,“ senkulpigis sin la viroj.

Malkuraĝe la timigitaj birdoj rigardis el la rifuĝejoj. Estis certe necese aranĝi interkonsiladon, elekti gardantojn, disloki ilin, interkonsenti signalon kaj signon, averti la najbaran birdan societon, sendi delegitojn kaj sciigi la malĝojan novaĵon al ĉiuj, kun kiuj la birdaro vivas de pratempo en paco kaj konkordo, precipe al perdrikoj kaj leporoj en la vasta kampo.

En la preĝejo dume la sankta meso estis daŭrigata. Plue muĝis la orgeno kaj kantis la homoj. La unuaj, kiuj rekonsciiĝis de la ĝenerala konfuzo, estis la infanoj, grupiĝintaj antaŭ la altara krado kiel floroj sur bedo. Iliaj vizaĝoj ridetis, en la okuloj ekbrulis gaja, ĝoja flameto kaj iliaj etaj fingroj montris al la altaro.

*

Jes, tie sur la tabernaklo, precize en la mezo inter du anĝelfiguroj, sidis kaŭre la malgranda, timigita parueto. Ĝi ripozis. Ĝia beketo estis iom malfermita, la delikata plumaro sur la brusto videble moviĝis, ĉar ĝi ĝis nun rapide spiris kaj ĝiaj nigraj okuletoj zorgoplene, malfideme vagis tra la preĝeja spaco. Ĝi sidis silente, la kapeton ĝi klinis flanken kvazaŭ ĝi aŭskultus la majestan kanton mesan, kiun la paroĥanaro kantis strofon post strofo.

Sed subite silentiĝis la orgeno, estis la kantado, kaj nur la altara sonorilaro arĝentvoĉe anoncis, ke venas la sankta momento de „Transsubstanciĝo de Kristo“. La pastro surgenuiĝis, kaj poste li dum profunda, respektoplena silento levis la sanktan hostion super la kapon por montri ĝin al la genufleksanta kristana komunumo. Kaj jen! En tiu majesta momento aŭdigis sin la parueto. Jubile ĝi pepis sian mallongan kantfrazon unuafoje – kaj kiam la pastro estis levanta la kalikon, ĝi danke kaj ĝoje ekkantis la duan fojon. Tio sonis tiel nekutime, tio surprizis kaj kortuŝis tiom profunde kaj vere, ke la akolito forgesis sonorigi kaj en la okuloj de la pastro kaj kredantoj aperis roso de larmoj.

De tiu momento la malgranda parueto fariĝis nia birdeto en la preĝejo. Ni havis la plej bonan volon liberigi ĝin, ni lasis fenestrojn kaj pordon la tutan tagon malfermitajn por ĝi, la parueto – kvankam ĝi sidiĝis sur la fenestra krado kaj rigardis eksteren, tamen – kvazaŭ en ĝia malgranda kapo vekigis rememoro je la terura alaŭdfalko, ĝi eksaltis kaj revenis en la preĝejon. Ĉi tie ĝi vizitis ĉiun angulon, kornicon kaj fendon, serĉis araneojn kaj muŝojn, la preĝejservisto ekamis ĝin, kaj ekamis ĝin ankaŭ la infanoj. Ili venadis ĉiutage al la porlerneja sankta meso, alportadis por ĝi panerojn en la poŝoj, metis ilin por ĝi sur la kradon antaŭ la altaro kaj rigardis la birdeton, kiel ĝi sidiĝas sur la randon de la malprofunda benakvujo marmora kaj trinkas. Dum ludis la orgeno kaj kantis infanaj voĉoj, la birdo silente aŭskultis, sed kiam dum Transsubstanciĝo silentiĝis la orgeno, aŭdiĝis ĝia kortuŝa,

delikata solkanto, tiel ke ĉiuj jam senpacience atendis ĉi tiun momenton, kaj la parueto neniam trompis ilin.

– Tiel pasis la Palmdimanĉo kaj alvenis la Paska Vendredo. La preĝejo plenpleniĝis de homoj kaj pro la malĝojo de tiu tago oni forgesis eĉ la parueton. Tiu ĉi sidas sur la altara kornico kaj atendas, kiam aŭdiĝos la sonorilo ĉe la sakristio; la orgeno en la ĥorejo kaj la homoj en la preĝeja navo – sed vane. La sonorilo pendas kiel mortinta, la orgeno kvazaŭ mutiĝis, ankaŭ la homoj silentas, nur la malserenaj sonoj de lignaj klakiloj ekbruas de tempo al tempo tra la preĝejo.

„Kio do? Kio do? Kial vi do ne kantas?“ malkviete demandas la parueto kaj flugas desur la altaro rekte en ĥorejon, kaj eksidas sur la fermita orgeno. Ĝia koreto bategas denove tiom, ke ĝia krispa plumaro sur la delikata brusto leviĝas. Ŝajnas al ĝi, ke malbona rabisto ŝtele eniras la preĝejon, ke alproksimiĝas mem la terura kaj fantoma morto kaj eĉ la preĝejo ne malhelpos ĝian eniron.

„Kio do? Kio do?“ ĝi pepis denove. Ĝi vidas la pastron malkovri la sanktan krucifikson, kisi ĝiajn vundojn, ĝi aŭdas la mallaŭtigitan de ploro kanton: „Popolo mia, popolo mia, kion malbonan mi faris al vi?“ Peza funebro plenigas la preĝejon, premas ĉies koron, kaj ankaŭ la koron de la parueto. Angoro kaj timo ekregis ĝin, ĝi sentis la premon, eksteren – eksteren en la mondon ĝi volas – eksteren, kie la suno brilas, arboj jam verdiĝas kaj kie kolorabundas bunta floraro sur verda herbejo.

Sur nigra kovraĵo sternita antaŭ la ĉefa altaro, sur la tero kuŝas krucifikso, antaŭ ĝi sur la ŝtona planko genuas la pastro, nudpieda, kun kapo nekovrita, kun manoj interfingritaj, kun okuloj larmantaj, ĉirkaŭ li genuas infanoj kaj plenkreskuloj kaj kisas la vundojn de la mortinta Savinto.

„Kio okazis do?“ traflugis la kapon de l' birdeto. „Mi fuĝos,“ ĝi ekpensis kaj de la ĥorejo flugis rektlinie al la ronda fenestro super la ĉefa altaro, tra kiu la leviĝanta suno verŝis abunde sian oran lumon sur la krucifikson kuŝantan sur tero.

Obtuza frapo, kiu eĉ la vitron en plumba kadreto trementigis, sonis tra la preĝejo. Ĉiuj surprizite levis la kapojn. Aĥ, la parueto flugis kontraŭ la fenestro, per sia brusto ĝi ekbatis sur la malmolan vitron, forpuŝis sin kaj jam ĝi ŝanceliĝas flugante kiel ebria. Du-tri turnojn tujposte ĝi faris, malespere ĝi skuas la flugilojn por teni la ekvilibron, tamen vane! Ĝi falas – falas pli profunden – ĉiuj senintence levas la manojn por kapti ĝin en la flugo – kaj ĝi falas senviva en la etenditan manplaton de la pastro... Tiu kisis ankaŭ ĝin, metis ĝin, malvivan, al la dornkronita kapo de Kristo kaj la tuta ĉeestantaro laŭte kaj korrompe ekploris.

Tradukis Vuk Echtner



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Prago
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Vydavatel:

Klub esperantistů v Praze

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

IČO 66004322

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7